

OPINIOJ, IMPRESOJ KAJ RAPORTOJ PRI LA KONFERENCO EN PORTONOVO 2008

1) Privas Tchipke (Benino)

(la unua esperantisto de Benino)

Mi volas danki al tuta estraro de ILEI kiu konsentis okazigi tiun konferencon en Benino kaj al Aida aparte pro ŝia granda sindono al la sukceso de la aranĝo. Mi vere pasigis tre bonajn kaj neforgeseblajn momentojn en la centro Songhai. Bedaŭrinde mi ne povis resti ĝis la fino de la konferenco.

Miaj impresoj pri la aranĝo estas tre bonaj. Mi nur bedaŭras ke partoprenis la aranĝon, tre malmultaj esperantistoj el aliaj afrikaj landoj. La alia afero estas la fakto ke la gazetaro ne preparolis la eventon, kiu laŭ mi estis tre grava evento. Komunikado pri tiu konferenco povus esti tre bona propagando por Esperanto.

La konferenco estis tamen tre sukcesa; mi alludas tiujn multnombrajn homojn el tiom da malsamaj landoj kaj kontinentoj kiuj, dum pluraj tagoj povis kuniĝi, babiladi, komuniki kaj amikiĝi. Tion volis Zamenhof.



2) Ewoé Sagbadjelou (Togolando)

(la artikolo aperis en IPR 2008/3)

La ĉi-jara konferenco de ILEI okazis en Portonovo (Benino) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008 kun la partopreno de e-istoj el Afriko, Azio kaj Eŭropo. En la unua tago de la aranĝo, post alveno de la konferencanoj, komenciĝis sub la gvido de *Tieko ISIKAWA* Interkona Vespero dum kiu ĉiuj sin prezentis, interparolis en etoso amikeca.

Merkredo, la 30-a de julio, estis dediĉita al la oficiala Inaŭguro de la konferenco. Ĝi ekis per la hiso de esperanta flago kaj la kantado de „La Espero“. Sekvis paroladetoj de diversaj eminentuloj: unue de *Hori YASUO* kaj *Renée TRIOLLE*; poste de *Privas TCHIKPE*, pioniro de la benina E-movado, kaj de *Adelabu SAIBU* je la nomo de la urbestro de Portonovo. Ĉi-lastata, dum la malferma ceremonio sciigis al partoprenantoj la antaŭajn nomojn (*Adjadje, Hogbonou*), kiujn havis la urbo Portonovo, riĉa pro siaj Songhai-centro, preĝejoj, moskeoj, vendejoj kaj manĝoj diversaj. Por fini li deziris, ke dua tia konferenco okazu en Benino. Indas menciigi la intervenon de s-roj *Francois HOUSSOUNOU* (LKK-ano, prezidanto de la Benina sekcio de ILEI), *Latifou GBADAMASSI* (LKK-ano, prezidanto de la landa E-Asocio) kaj *Francis KODJOVI AGBENOU* (oficisto en la Afrika Oficejo) por prezenti raporton pri siaj respektivaj agadoj. Estis laŭlegitaj salutoj de AIS kaj ISAE. Tuj poste, efektivigis entute tri prelegoj: *Renée TRIOLLE* informis pri UNESKO, ties rilatoj kaj kunlaboro kun UEA. *Hori YASUO* parolis pri la E-movado en Azio. *Jean Pierre BOULET* gvidis diskuton unue rilate al edukado en Afriko, pri la maniero laŭ kiu patrino devas prizorgi infanojn, due pri herboj/plantoj uzeblaj en kuirado kiel manĝoj kaj en kuracado. Li parolis rilate al la ielo utiligi tiajn herbojn. Venis la momento ekzameniĝi: *Mireille GROSJEAN*, respondeculino pri la organizado de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, anoncis la ekzamenojn senpagaj. De la gramatika testo ĝis la parola parto, la kandidatoj laboris dum tri tagoj. Ĉe la fino, la sukcesintoj ricevis atestilojn. Aliaj eroj de tiu inaŭgura tago estis la konversacia kaj amika rondoj, kies prizorgantoj intervenis preskaŭ ĉiutage.

La laboroj de ĵaŭdo komenciĝis jene: *Ana MONTESINOS* enkondukis siajn *lingvajn ludojn por la klasĉambro*, prezentante diversajn tipojn de bildludoj, kio permesis al ĉeestantoj elekti tia(j)n aŭ alia(j)n objektojn uzeblajn en iliaj respektivaj landoj. Scio pri manĝoj, manĝkutimoj de la ĉeestantoj laŭ ties landoj aldoniĝis al ŝia laboro alian tagon. *Vlad'ka CHVÁTALOVÁ*, en la traktado de sia temo por lingva festivalo – *multlingva renkontiĝo kaj dialogo inter kulturoj* – informis la partoprenantojn pri diversaj etnoj, lingvoj parolataj en ties landoj, iliaj devenoj ktp. Fine de la konferenco okazis *Lingva Festivalo* kun prezento de 15 lingvoj, el kiuj 6 estis afrikaj. Notindas, ke ambaŭ s-anoj finis siajn taskojn post kelktaga renkontiĝo kun partoprenantoj foje en komisionoj. Samhore kaj ankaŭ en sekvaj tagoj, kunsidis komitatanoj de ILEI por decidi rilate al la aferoj de la ligo. Posttagmeze okazis la unua ekskurso al *Aguegues*. Aliaj vizititaj lokoj dum la aranĝo estis *Adjarra, Bimins, Dangbo*, kiuj prezentis al la tien-vojaĝantoj buntajn vidindaĵojn.

Vendrede daŭris la kutima programo de la konferenco kun siaj ĉiutagaj programeroj. Sabate okazis Simpozio, dum kiu ni sekvis prelegojn kaj partoprenis en diskutoj. Inter la amuzaj eroj troviĝis muzikado kaj origamio: *Hori*, montrante kolektitajn muzikilojn kaj ludilojn, aŭskultigis iliajn melodiojn. Li ludis kaj ludigis kelkajn instrumentojn. Kantoj kaj aplaŭdoj akompanis lin, kio amuzis ĉiujn. Estis okazo konatiĝi kun arto de paperfaldado. Tion prezentis ges-anoj „Mayuko kaj aliaj“. Ili lernigis kiel krei diversajn formojn de objektoj (birdoj, kovertoj) per paperfaldado.

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso tra Portonovo. Eksterafrikaj samideanoj kolektis monon por pagi partoprenon en la ekskurso de ĉiuj dezirantaj afrikanoj.

En la antaŭlasta tago de la konferenco, ĝenerala asembleo antaŭis la solenan Fermon. Post tio, la partoprenantoj markis la eventon plantante unu arbidon en la konferenceja domo *Songhai-centro*. La vespero estis agrabligita per spektaklo (kantoj, dancoj, tamtam-ludoj, vestoj) de loka teatrogrupo tre ŝatata de konferencanoj, kiuj senhezite imitodancis. Dum la disdono de atestiloj pri la ekzamenoj, la afrikaj helpantoj ricevis etajn suvenirojn de Nederlando – lando de la ĉi-jara

UK, la eksterafrikaj helpantoj ricevis afrikajn muzikilojn. La oficiala disiĝo ekis en la posta tago, tuj post la matenmanĝo.

Mi pasigis belan semajnon en Portonovo, renkontante multajn gesamideanojn (el diversaj landoj), kun kiuj mi lernis, babilis, ludis, amuziĝis, manĝis, resume partoprenis al programeroj. (*fino de la artikolo*)

Aldone: Miaj impresoj pri la konferenco: mi estis ĝoja pri la organizado de la konferenco ĝenerale pro la programeroj interesaj kaj kulturo-riĉaj, pro la kontribuo eĉ eta de ĉiuj partoprenantoj kaj pro bona etoso amikeca, kiu regis tie. Tamen mi bedaŭras, ke malmultaj afrikanoj precipe virinoj ne partoprenis al tiu grava aranĝo, kaj ke mi ne konatiĝis kun la programo antaŭ la konferenco.



3) Antoine Kouablan (Ebura Bordo) (aperis en bulteno Esperanto en Afriko)

Ĉu necesas denove danki al ILEI/UEA? Jes, koro mia tion deziregas, ĉar tiuj instancoj verege montris al ni afrikaj esperantistoj ke ili nin ne nur vorte amas sed ankaŭ psike, kore, samideane kaj sincerplene nin amas, pro tio ili senhezite okazigis la unuan ILEI-konferencon en Afriko. Pri la konferenco, jam ĝi eniras en la afrikan Esperantan historion. Ĝi estis agrabla travivaĵo ne nur por afrikanoj sed ankaŭ por la eŭropaj samideanoj, ĉar ili alvenis al ni kaj vidis kaj konstatis ke ankaŭ en Afriko ekzistas talentaj esperantistoj. La konferenco okazis kun verda etoso esperantista, ĉar preterpasante aliulon oni devis ĉiam lanĉi tian amikan vorton: /Saluton!/
La programoj estis tre interesaj, kaj tre aparte mi ŝatus danki al s-ro Jean-Pierre Boulet pro la provitaminaj projektoj de Unesko: vere estis la unua fojo por mi verki rakonton (libroforme) dum tre mallonga tempo. Kara Boulet, vi vere permesis al mi taksi kaj aprezi talenton mian. Mi

sincere dankas al Andre Gokan kaj Aimé pro la desegnaĵoj en la Unesko-libreto. Alie rimarkinda kaj mirinda estis Aida, ĉar foje ŝi amike rolis kiel policaninon. Karulino mia, vi meritas niajn dankegojn pro viaj spertoj. Alie mi ŝatus senfine danki al s-ro Yosuo el Japanio, Ana el Britio, Mirejo el Svislando, Vladka ktp, ĉar vi ĉiuj lernigis al ni neforgeseblaĵojn. Al niaj beninaj samideanoj kaj al la LKK-anoj mi tre samideane kaj amike vin dankas pro via gastemo.



4) Jérémie Sabiyumva (Burundio) (aperis en dissendolisto Portonovo-2008)

Survoje al la konferenco mi ege pensis pri kiok okazos kaj provas diveni tion. En mia kapo ĉiam venas la ideon ke afrikaj esperantistoj montros nian sperton al alimondanoj ĉar ĉi konferenco estas la unua grava internacia aranĝo okazinta en Afriko. Por ni, burundiaj esperantistoj, kiuj partoprenis por la unua fojo ILEI konferencon (kaj la unua internacia aranĝo), la konferenco en Benino estis travivaĵo kiu faris sur nin neforgeseblan impreson. Post kiam la aviadilo surteriĝis en la fluhaveno de Cotonou ni telefonvokis lokan esperantiston sed, bedaŭrinde nia kara samideano estis ege okupita, kaj sendis al ni taksiston, kiu kunportis nin al hotelo en Cotonou. Ni tranoktis tie, kaj dimanĉon, Latifou (la Prezidento de la benina asocio, kiu loĝas je ĉirkaŭ 130 km) venis en la hotelon kaj kuniris al Portonovo (je ĉirkaŭ 30 km de Cotonou), la loko, kiu gastigis la konferencon. Tie, ni renkontis Charles ALOFA la prezidanto de LKK, kiu afable bonvenigis nin. Tiu unua kontakto kun la aranĝantoj donis al ni tre bonan impreson pri beninaj esperantistoj. Ili estis vere helpemaj, afablaj kaj kamaradecaj.

London, Alofa veturigis nin al Cotonou por aranĝi nian vizon, ĉar ne eblis akiri ĝin ĉe la flughaveno (kiel ni antaŭe pripensis) pro la fakto ke sabate la oficejo pri migracio estas fermita. La kamarado estis apud ni kaj ege helpis.

En la unua tago de la konferenco (mardon), ni ricevis niajn konferencdokumentojn (post matenmanĝo) kaj poste mi helpis en kelkaj aranĝoj. Mi soife atendis la venontan tagon por la inaŭguro oficiala de la konferenco. Mi profitis ĉi libran tempon por paroli kun diversaj esperantistoj el Eŭropo, kaj ege interesis al mi la kunparolo kun Mirejo kaj Jean Pierre Boulet. De ili mi lernis multon pri la movado en la mondo kaj en Afriko.

Merkredon, okazis solena inaŭguro (kun Esperanta Himno, kiu estis por mi ege grava ĉar mi jam kantis ĝin nur en marto kun Klarita), kiu estis ege impona kun ĉeesto de la Re prezentanto de la Urbestro. La gasto parolis loklingve, kaj lokaj esperantistoj tradukis al ni.

Ni vere komforte loĝis, bonguste manĝis kaj sukcese konferencis en la centro Songhai. La programo de la konferenco estis tre riĉa: ege impresis al mi la instruludojn de Ana, la Deklaracio pri Homaj rajtoj de René, Verkado de libro, prelego de Hori Yasuo, japana muziko de Majuko, lingva festivalo de Vladka kaj aliaj programeroj de la konferenco.

Alia grava punkto, kiun mi neniam forgesos estas la okazigo de la internacia ekzameno, en kiu kandidatiĝis en meza nivelo, kaj feliĉe mi trapasis la ekzamenon kaj eĉ sukcesis. Mi ne antaŭe pripensis la ekzamenon, sed en mia unua kunparolo kun Mirejo, mi ege interesiĝis kaj eĉ informis al ŝi ke mi partoprenos la ekzamenon.

Mi partoprenis en unu interesa ekskurso ĉar mi ne povis partopreni en ĉiuj eksekursoj pro la fakto ke ekskursoj okazadis samtempe kun la ekzameno. Ni piediris la urbon, vizitis muzeon kaj la ĝardenon kaj ĉiam la deĵorantoj afable ricevis nin. Mi amikiĝis kun la laboranto de la muzeo, kaj li promesis lerni Esperanton. Mi jam ricevis lian mesaĝon kaj baldaŭ sendos al li kurson rete. Aliflanke, mi volas laŭdi la etoson dum ĉi ekskurso, kiu estis tre amikeca, esperanta kaj bona por mi, kiu neniam aŭdis pri beninaj maskoj kaj pri misteraj arboj de Benino. Bedauxrinde ne estis rubando aŭ afiŝo, kiu devis identifiĝi nin al neesperantistoj, (kaj laŭ mi tiu ilo ege gravas ĉar ĝi plifaciligas la infomadon).

La bankedo estis ege bona kun loka danco. Dum la bankedo, okazis disdono de donacoj al ne sukcesintoj de la ekzamenoj en ambaŭ niveloj kaj atestiloj (kun donacoj) al sukcesintoj.

Ni revenis al Burundio spirite riĉiĝitaj kaj kun multaj kontaktoj kun novaj interesaj kamaradoj el diversaj landoj de nia planedo. Mi jam komencis la korespondadon kun pluraj el ili.

Se mi rajtas fari iujn konkludojn pri la organizado de konferenco, havante unu nuran konferencan sperton, do mia konkludo estas ke la konferenco estis organizita rimarkinde ĉar en Afriko ni ne ankoraŭ organizis tian aranĝon. La loko por la kongreso estis elektita tre bone — facile atingebla kaj trovebla, bonaj ebloj reklami Esperanton al la loĝantoj aŭ feriantoj. Aplaudindas la organiza laboro de LKK. Bedauxrinde ne estis sufiĉaj informoj (afiŝoj pri la konferenco) en kaj ekster la centro (nur unu afiŝon mi vidis en la manĝejo) kaj ne okazis kunsido de afrikaj esperantistoj el diversaj landoj por preparoli strategiojn por antaŭenigi la movadon. Ni esperu ke en venontaj aranĝoj afrikaj ke tio ne reokazos.

Resume: kongreso bunta, bela, varia, interesa, glata, internacia! Grandegan dankon al ĉiuj organizantoj pro ilia sukcesa laboro kaj al UEA/ILEI kiuj subvencisi partoprenon de afrikanoj.

5) Mirelle Grosjean (Svislando)

En julio kaj aŭgusto 2008 okazis ILEI konferenco en Songhai Centro en Portonovo, Benino. Tiu centro estas agrikultura institucio, kiu lertigas junulojn el Benino kaj el najbaraj landoj. Estas granda Centro kun 120 litoj. Povas esti kelkaj malsamaj grupoj laborantaj samtempe en la Centro pri diversaj temoj. Mi partoprenis tiun ĉi konferencon de ILEI. Estis mia unua restado en Afriko.

Mi multe promenis en la centro Songhai (15ha) kaj hazarde alvenis al halo, kie la studentoj kamparanoj vespermanĝis. „Avino, venu manĝi kun ni!“ ili diris. Mi respondis: „Ne, post 20 minutoj mi manĝos kun mia grupo!“ „Tamen restu kun ni!“ Mi protestis, tamen venis plena telero por mi, mi devis manĝi, mi ne plu povis rifuzi. La telero entenis nutraĵon por junulo, kiu laboris en la kampoj dum plena tago... Tiel oni dikiĝas en Afriko...

Tie studis du junuloj el Liberio: Theophilus Trabor kaj Blanyon Befers Himmie. Ili estas proksimume 30jaraj, inĝenieroj pri agrikulturo. Do mi konatiĝis tiel kun Theophilus kaj Blanyon kaj ni parolis pri Esperanto. Ili volis tuj eklerni. Dum mia lasta tago en Portonovo mi instruis al ili kelkajn bazajn konojn pri Esperanto dum horo sur benko sub arbo. Ili lerte lernis. Ili petis, ke ni refaru lecionon la venontan tagon. Temis pri la tago de mia foriro. Post la tagmanĝo, anstataŭ ol siesti, ni kunvenis kaj studis sub arbo dum du horoj. Ili malkovris la tabelvortojn kaj bonege kapablis dedukti el „ĉio – nenio,, „ĉiam – neniam“ k. t. p. Ili havis plezuron. Mi donis al ili la retadreson de Paul Kwasi Mensah, esperantisto en Ganao, do junulo anglalingva. Unu el ili diris: „Tiu ĉi momento estas grava: estas la unua paŝo al kreo de Esperanto Asocio de Liberio!“

Bv subteni ilin pere de salutmesaĝoj en la angla a“ en tute simpla esperanto. Se vi povas sendi al ili vortaron, estus bone. jtheotiabor65@yahoo.com kaj Bbhimmie@yahoo.com

Elkore salutas kaj dankas Mirejo

6) André Gokan, Emile Agbassou, Vihou Iréné Kakpo, kaj Bernard Gnancadja (Benino) (aperis en bulteno Esperanto en Afriko)

La 41-a konferenco de ILEI – kiu okazis la unuan fojon en Afriko, precize en la Songhai-centro de Portonovo — estis granda evento por ĉiuj afrikanoj. Ni neniam travivis ion tian en nia Esperanto-vivo. De tiu konferenco ni lernis pri multo. Dum ĉi tiu konferenco, la interkonatiĝo okazis: oni interŝanĝis siajn sciojn kun aliuloj. Ni havis multajn gvidantojn, kiuj bone prizorgis la konferencan movadon kaj ĝia evoluo. Oni manĝis diversajn manĝaĵojn, trinkis diversajn trinkaĵojn. En la konferenceto ni ludis muzikon, kaj estis ankaŭ dancado por kontentigi ĉiujn partoprenantojn. Denove, aliaj diversaj ludoj okazis por amuzi ĉiujn ĉeestantojn. Niaj dormejoj aŭ dormĉambroj estis tre puraj. Ni havis ankaŭ okazon por amikiĝi kun aliaj, kun kiuj ni povis interkomuniki por ekscii novaĵojn.

Vere, la ĝojego daŭris dum tuta nia restado. Ni aŭdis multajn novaĵojn de eksterlandanoj, kaj reciproke ni ankaŭ sciigis ilin pri la niaj. Alia gravaĵo estis la Internacia Ekzameno de ILEI kaj UEA, kiun partoprenis tiuj kiuj volis. Estis du diversaj ekzamenkategorioj: elementa nivelo kaj meza nivelo. Je la fino de tiu ekzameno, ni havas tri sukcesintojn por la elementa nivelo kaj ankaŭ tri sukcesintoj por la meza nivelo. Ĉiuj sukcesintoj ricevis atestilon, kaj por kuraĝigi tiujn kiujn ne sukcesis, la respondeculoj pri la ekzameno disdonis al la nesukcesintoj kelkajn premiojn. En la fino de la konferenco, ni gekonferencanoj plantis oranĝplanton kiun ni

nomis ILEI-konferencarbo; ĝia signifo estas ke kiam tiu arbo kreskas, la movado de Esperanto en Afriko ankaŭ kreskas aŭ evoluas.

Vere estis bela travivaĵo por ĉiuj ĉeestantoj.

7) René Triolle (Francio)

Bone ke ĝi okazis kaj okazis en tre taŭga loko, kie eblis bele tranokti, duŝi kun tre bonaj manĝoj el ĵus produktitaj varoj; belaj eblecoj promeni tra la Centro mem, eĉ se komuna ekskurso kun klarigoj ne okazis.

Iom tro formaleca (malfermo: tro tikla respekto de horaro: dufoje, kaj mi mem diris al Aida, vi intervenis abrupte sen konsidere de la okazantaĵoj, vi interrompis ludon de Ana, kiu ĵus estis kreinta agrablan etoson kaj miksinta la generaciojn kaj landojn; same dum prelegoj (evidente vi estis en aparta ĉambro kaj ne povis sekvi la tuton, sed minimume vi fidus la homojn, kiuj mem kutimas gvidi kunvenojn) viaj intervenoj, ne tre diplomataj ŝokis kaj ofendis iujn afrikanojn (mi resumas: ni pagis por vi, vi obeu nin).



Tro da diskriminacio inter la eksterlandanoj, kiuj estis venintaj por ekskursi kaj la afrikanoj, kiuj estis venintaj aŭ venigitaj por praktiko. Feliche la francoj — Monique, Jacqueline kaj mi — savis la situacion.

Sed ĝenerale, mi tre ĝojas pri mia partopreno, ĉar kvankam mi mem en UEA respondecis pri afrika agado kaj sciis pri la manko de pedagogia materialo, mi ne havis imagon pri la entuziasmo, intereso kaj malfermo de la afrikanoj kaj pri la foresto de ĉio. Mi supozeble, ek de nun, ankoraŭ pli fervore provos konvinki esperantistojn plusendi gazetojn kaj librojn, ne nur lernolibrojn.

Manko da kontaktoj kun la lokaj gazetoj, radioj, asocioj k. t. p, sed Aida ne konis la lokojn kaj la homojn, same la afrikanoj.

8) Yollande Agbenou (Togolando)

Pri la konferenco mi tre ĝojas ĉar tiu konferenco estas la unua konferenco internacia kiun mi partoprenis kaj dankas la organizantojn.

Plaĉas al partopreni aliajn.

Mi tre ĝojas pri ĉiuj.

Kore mi estas Yollande

9) Simon P.Smits (Nederlando)

Mi vojaĝis per aviadilo, unue de Schiphol al Parizo, Charles de Gaulle; tie mi eksidis en la aviadilo por Cotonou, posttagmeze, sed ni devis atendi en la aviadilo dum 2 horoj pro striko en la flughaveno.

La aviadilo estis Airbus A340-300; la distanco de Parizo al Cotonou estas \pm 4 500 km.

Ni alvenis tie ja 21h25 (nederlanda horo; en Cotonou estas unu horo pli frue).

La loka mono estas la 'franko CFA' (franko de la Communauté Francophone d'Afrique); 655 frankoj valoras 1 eŭron.

En la konferenco ankaŭ ĉeestis la ununura alia nederlandano, s-ino Miny Massar-van Diepen.

Pro la landa klimato oni devas kiel eŭropano gluti pilolojn kontraŭ malario.

Ni kunvenis en 'Songhai-Centro' en Porto Novo.

En hotelo en Cotonou la ĉambroj kostis por unu nokto 25 500 FCFA \pm 39 eŭroj.

10) Tiekō Isikawa (Japanio)

(artikolo aperis en revuo Esperanto)

La unua tutmonda internacia Esperanto-aranĝo en Afriko, la 41-a ILEI-Konferenco okazis inter 29/07 kaj 05/08/2008 en Portonovo, Benino kun 73 aliĝintoj el 16 landoj. Efektivaj partoprenintoj el kvin landoj de Afriko, nome Brundio, Ebura Bordo, Ganao, Togolando kaj Benino estis 23 (inkluzive de du unutaga kaj tritaga partoprenintoj), kaj de naŭ eksterafrikaj landoj alvenis 21. Francoj plej multe nombris sep kaj sekvis japanoj kun kvin. Subvencioj de UEA, ILEI kaj kelkaj privataj personoj ebligis partoprenon de afrikanoj, kaj notinde estas la fakto, ke la franca sekcio de ILEI helpis partoprenon de juna afrikanino kun sufiĉe da monsumo kiun ili gajnis per aŭkcio. Origine estis nur unu virino sur la listo de subvencioj kaj pro tio francoj volis surloke venigi virinon, ĉar ili pensas, ke en Afriko doni al virinoj ŝancon sin klerigi estas grave.

La konferenco malfermiĝis vespere la 29-an laŭ la lastjaraj kutimoj per Interkona Manĝovespero kaj ni prezentis tipajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn de niaj propraj landoj kiujn ni

kunportis. Manĝante kaj trinkante ni rapide interkonatĝis post sinprezento-ludo de ĉiuj ĉeestintoj, kiun gvidis Mireille Grojean.

Rezulte de fervora apelacio de LKK-anoj ĉeestis en Inaŭguro altrangulo de la urbo Portonovo en festovesto. Venis ankaŭ la unua esperantisto en Benino, Privas Tchikpe, kiu salutante parolis historieton de Esperanto-movado en la lando. Oni berdaŭrinde ne sukcesis venigi ĵurnalistojn. Dum la inaŭguro Hori Yasuo, estrarano de UEA respondeca pri landa kaj regiona agado, salutis kaj mesaĝoj de la prezidantoj de UEA, ILEI, de la ĝenerala sekretario de ISAE kaj AIS estis laŭtlegitaj.

Programeroj tradiciaj kaj apartaj por afrikaj samideanoj variis dum la konferenco. Antaŭvidita Simpozio kun la temo „Pedagogio de Esperanto: Afrikaj spertoj kaj defioj“ estis, pro diversaj kialoj, nekompleta sed parolis Renée Triolle pri franca instrusistemo kaj Hori Yasuo pri japana konstitucio, François Lo Jacomo prezentis referaĵon pri graveco de edukado en gepatra lingvo, Latifou Gbadamassi projekton „Mondo Rondo kiel Esperanto-lanĉilo en la Infana Mondo en la Tria Mondo ĉefe en Afriko“ kaj ties realigo en Afriko. Lingva Festivalo, dum kiu partoprenantoj mem skize prezentas siajn lingvojn kaj scietigas kaj spertigas al homoj diversecon kaj abundecon de lingvoj kaj kulturoj, okazis kun 15 lingvoj prezentataj, inter kiuj troviĝis 6 afrikaj regionaj lingvoj kiel ekz., svahila kaj adja [aĝa]. Ekzameno de UEA/ILEI finiĝis sukcese; tri en la meza kaj aliaj tri en la baza nivelo sukcesis, dum ekzameniĝis pli ol dek. Estrarkunsido ne okazis, dum dufoje okazis komitatkunsido tamen kvorummanke.

Aparta estis la projekto gvidita de Jean-Pierre Boulet „Verkado de libreto cele al edukado en Afriko, lige al Uneska laboro“. La celo estis verki rakonton por instigi Afrikajn virinojn eviti mortojn de infanoj per racia, simpla, malmultekosta nutrado. Mirinde, ke post ne longe kelkaj afrikanoj kune verkis iun rakonton, kiun Jean-Pierre proponos al UNESCO por traduko al la franca kaj al la angla. Ana Montesinos per „Lingvaj ludoj por la klasĉambro“ prezentis diversajn tipojn de ludoj. Multspecajn instrumaterialojn ŝi kunportis kaj disdonis parton de ili al afrikaj kolegoj. Renée Triolle, trovinte mankon de sesioj traktantaj konferencan temon „Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero“, gvidis kelkfoje grupon de afrikanoj kaj kune diskutis pri diversaj problemoj.

Konferenco tamen ne estis nur por seminarioj. Okazis kvar duontagaj ekskursoj al najbaraj vilaĝoj, parkoj kaj similaj, kaj la plej ŝatata estis boatvojaĝo al Aguegues, surakva vilaĝo. Tutatagan ekskurson tra Portonovo ĝuis ankaŭ afrikaj samideanoj, kion ebligis monoferto de eksterafrikaj partoprenintoj de la konferenco. Ni estis en granda grupo, do lokaj homoj ŝajne interesiĝis pri ni. Tiuj ekskursojn ĉefe aranĝis LKK-ano Sébastien Essou. Komuna kantado kaj kurso de origamio ankaŭ estis ŝatataj de konferencanoj.

Malgraŭ diversaj malfacilaĵoj kaŭzitaĵoj ĉefe de lokaj cirkonstancoj, LKK gvidita de J. Charles Alofa bone organizis la konferencan, kaj sen granda problemo ni ĝuis konferencajn tagojn en Songhai Centro, kiu estas taŭga kaj agrabla ejo por nia konferenco. Vivkondiĉoj en la centro estis multe pli bonaj ol ni antaŭe timis, kaj ni trovis la centron pura kaj modesta. Aprezinda pri ĉifoja konferenco estis, ke japanoj multe helpis farante konferencajn sakojn, estrano de ILEI el Japanio kompilis konferencan libron, pretigis nomkartojn, leterfoliojn, kovertojn, glumarkojn kaj ĉion niaj gekolegoj alportis el Japanio ĝis Roterdamo, kie preskaŭ tuton transprenis itala samideano Marco por porti ĝis Portonovo. Tio estas bela ekzemplo de kunlaboro inter afrikanoj kaj japanoj, kiu ĝis tiam malofte okazis.

Multaj afrikaj samideanoj tre bone parolas Esperanton kaj ili estas energiplenaj, entuziasmaj kaj sinceraj por la movado. Precipe impresa kaj konvinka estis perkomputila prezentado de du brundianoj pri Esperanto-movado en Brundio. Inter la partoprenintoj estis kvar

lernantoj (15-16 jaraĝaj) el la urbo Lokossa. Ili estas nia „espero“. Mi estus feliĉa se nia partopreno omaĝis kaj kuraĝigis afrikajn samideanojn.

11) Kodjovi Francis AGBENOU (Benino)

(oficisto de AO raportis en landa-agado)

Finfine okazis la konferenco de ILEI en Afriko, en Benino, en la urbo Portonovo. Partoprenis konferencanoj el jenaj landoj: Nederlando, Francujo, Japanujo, Ĉehujo, Britujo, Aŭstralio, Litovujo, Italujo, Togolando, Benino, Ebura Bordo, Burundo, Ganao. Entute 42 partoprenantoj ĝuis tiun konferencon.

La 30-an de julio 2008 malfermiĝis la konferenco per la levo de la verda flago. Estis kantita varme la himnon La espero ĉeeste de la reprezentanto de la urbestro. Solene estis prezentitaj la oficialaj salutmesaĝoj de UEA, fare de Hori Yasuo, de ILEI fare de Isikawa Tiekio, kaj la salutmesaĝo de LKK fare de Charles Alofa, de la Afrika oficejo de UEA fare de Francis Agbenou. Tuj poste okazis la akcepto de la urbestro al la esperantista delegitaro por komune manĝi tutamikece.

Venis la momento prelegi pri homaj rajtoj, sub la gvido de René Triolle, kaj psote de prelego pri plantoj je vitaminoj sub la gvido de Jean-Pierre Boulet, Lingva festivalo sub la gvido de Vlad'ka Chvatalova, Lingva ludo sub la gvido Ana Montesinos, prezentado de projekto "Mondorondo" de Latifou kaj la ekzamenoj sub la gvido de Mireille Grosjean.

Bele la konfereco tre buntiĝas je multaj aktivecoj rilate al lingvo-kono, okazo renkonti nekonatajn amikojn, kultura festivalo dum kiam rave koncerto estis prezentita de Mayuko Tazima kaj de Hori Yasuo, kiuj dancigis ĉiujn konferencanojn je la sono de japana gitaro. La tuta ĉambro entuziasmiĝis kaj aŭdeblis ĉie kantkrioj kaj dancaĝoj.

Okazis ĉefe multaj diskutoj pri la plibonigo de la situacio de Esperanto en Afriko.

Ĉiuj konferencanoj multe ĝojas pro tiu bela evento kiu ebligis al ili pli koni la evoluon de Esperanto en Afriko kaj en diversaj landoj de Afriko.

La 5-an de aŭgusto 2008 okazis la solena fermo per oficiala voĉo de Aida Ĉizikaite reprezentanto de ILEI en la konferenco.

La Afrika Oficejo dankas al UEA, ILEI kaj al ĉiuj, kiuj materie kaj finance helpis al ĉi-tiu konferenco. Estis omaĝo al Esperanto, omaĝo al Afriko, omaĝo al ILEI kaj al UEA. Soifas ĉiuj regustumi tiajn eventojn en Afriko.

12) Monique Arnaud (Francio)

(aperis en federacia bulteno en Francio)

Mi citas la vortojn de Radojica Petrović, prezidanto de ILEI: „Esperantistaj instruistoj de ĉiuj kontinentoj renkontiĝas en Portonovo por kune akcepti la defiojn, lerni unu de aliaj kaj kuraĝigi sin reciproke sur la vojo de Zamenhofaj idealoj.“

Partoprenis en la konferenco 21 eksterafrikano: Francio — 7, Japanio — 5, Aŭstralio — 2, Nederlando — 2, Italio, Britio, Svisio, Ĉeĥio, Litovio — po 1 kaj 23 afrikanoj: Ebura Bordo

— 1, Ganao — 2, Burundio — 2, Togolando — 3, Benino 15 ; inter ili 2 virinoj el Togolando (unu el ili invitata danke al la profito de la aŭkcio de nia nacia kongreso en Martigues 2008).

„Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero“ estis la temo , ne pritraktita dum prelegoj sed spertita tra diversaj interŝanĝoj.

Renée Triolle prelegis pri UNESKO, Jean-Pierre Boulet starigis atelieron por verkado de libreto cele al edukado en Afriko, lige al Uneska laboro. Vlad'ka Chvatalova organizis Lingvan Festivalon, la Afrikanoj povis prezenti siajn multnombrajn lingvojn. Jasuo Hori prelegis pri Japanio, kunportis muzikilojn kaj ludigis la partoprenantojn per ili!

Ana Montesinos prezentis lingvajn ludojn por la klasĉambro, organizis atelieron pri la diverseco de la nutrado tra la mondo.

Tieko Isikawa proponis seminarion pri Origamio — japana arto pri paperfaldado.

Latifou Gbadamassi prezentis instruadon en diversaj lernejoj, ni povis konstati la mankon de simplaj lerniloj!

Mireille Grosjean organizis ekzamensesion por la elementa kaj meza niveloj. Sébastien Essou gvidis la ekskursojn kaj konatigis nin kun la lando kaj la homoj en la taga vivo!

El nia provenca federacio partoprenis Renée Triolle kaj Monique Arnaud, Renée zorgis pri konversacia rondo kaj Monique helpis.

Renée prelegis ankaŭ pri la franca instrusistemo, kiu devigis Jules Ferry kaj la tiaman registaron investi por konstrui lernejojn, trejni instruistojn, eldoni librojn, kiel multaj afrikaj landoj hodiaŭ pro la decidoj de Dakaro 2000: forigi analfabetecon antaŭ 2015. Benino, inter la Afrikaj landoj, estas unu el la plej respondecaj.

Post la Konferenco 7 eksterlandanoj — eŭropanoj — pluvizitis la landon, renkontis esperantistojn, vizitis orfejon, kie oni instruas esperanton, salutis rifuĝintojn el Togolando, malkovris la projekton de Patro Jah, (videbla ĉe-diasporafrika@yahoo.com) kaj vizitis famajn historiajn lokojn.

Ni ne povas fini tiun artikoleon sen mencii la imponan influon de la religioj. Ni perceptis la religian etoson de Benino (tra diversaj ceremonioj kun muziko, kantoj, dancoj...) en tiu lando multaj estas katolikoj, protestantoj, islamanoj — ĉefe tage kaj voduanoj — ĉefe nokte!

Por ĉiuj kaj ĉefe por esperantistoj, Benino estas alloga, vizitinda lando.

13) IOM DA STATISTIKO PRI LA KONFERENCO

Aida Čižikiatė (Litovio)

(la artikolo aperis en IPR 2008/3)

Al la konferenco aliĝis 73 personoj, sed partoprenis malpli. 21 personoj el ekster Afriko: el Francio 7, el Japanio 5, el Aŭstralio 2, el Nederlando 2, po 1 persono el Ĉeĥio, Britio, Italio, Svislando kaj Litovio. El Afriko partoprenis 23 personoj: 15 el Benino, 3 el Togolando, 2 el Burundio, 2 el Ganao, 1 el Ebura Bordo. Nur 1 persono venis por 1 tago, kaj 1 persono por 3 tagoj. Ambaŭ el Benino. Nur 2 eksterafrikaj aliĝintoj ne partoprenis; por pliaj afrikaj partoprenantoj mankis financaj rimedoj. Dum la semajno de la UK prof. *A. PORTILLO* el Venezuelo informis, ke li ne povas veni; *L. MADELLA* el Italio eĉ ne planis veni, nur per aliĝkotizo subtenis la konferencon. UEA dediĉis 1 000 EUR por subvencioj, ILEI proprakoste subvenciis ĉirkaŭ 10 partoprenantojn, kelkaj e-istoj faris pli aŭ malpli grandajn personajn donacojn (listo de sponsoroj aperos en la repaĝo de ILEI).

La franca sekcio surloke decidis inviti virinon esperantistinon – *Yollande AGBENOU*. *François HOUNSOUNOU* ne povis ĉeesti dum la tuta konferenco, do rapide trovis anstataŭanton – *Jozeph TCHOKPODO* – la ĝenerala sekretario de la landa asocio de Benino. Kelkaj partoprenantoj venis pli frue kaj tuj iris al la Centro aŭ ekskursis – laŭ propra deziro.

La lokaj organizantoj klopodis renkonti ĉiujn, sendepende, en kiu tago kaj kiu horo la partoprenantoj venis. Dankon al ili pro la zorgo. *Tieko ISIKAWA* zorgis pri pretigo de la konferencaj sakoj, helpis al la prezidanto de LKK *Charles ALOFA* dum la Solena Inaŭguro, ankaŭ gvidis la programon dum la Interkona Vespero kaj la unua konferenca tago. Dum la solena Inaŭguro partoprenis reprezentanto de la urba municipo kaj princo de unu el la lokaj triboj, kiun invitis samideanoj *Monique ARNAUD* kaj *Jean-Pierre BOULET*. Reciproke pro la omaĝo, ili estis invitataj al edziĝfesto de la princo, kiu okazis tuj post la konferenco. Mankis eblo hisi flagon, sed LKK elturniĝis kaj ni havis dum la tuta konferenco flagon apud la konferencejo. Estis pendigitaj 3 konferencaj afiŝoj kaj 1 informilo (anglalingve, ĉar estis granda grupo de usonaj studentoj) en la restoracio. Kelkaj personoj neesp-istoj estis interesitaj kaj ofte estis kun ni. Salutvortojn sendis UEA, AIS, ISAE, la prezidanto de ILEI, salutis la prezidanto de landa asocio, la prezidanto de landa ILEI-sekcio, la prezidanto de LKK, la unua e-isto en Benino – *Privas TCHIPKE*. Al la ekzamenoj aliĝis 15 personoj kaj sukcesis 6 (5 afrikaj samideanoj). Dum la Lingva Festivalo estis prezentitaj 6 afrikaj lingvoj (entute 15). Ĉiutage okazis konversacia rondo kaj longaj amikaj neformalaj interparoloj en malpli grandaj grupetoj. La ekskursojn prizorgis kaj gvidis la membro de LKK *Sébastien ESSOU*. Bedaŭrinde la ekskursoj estis tro kostaj por afrikaj samideanoj, sed partoprenantoj decidis kolekti iom da mono por partoprenigi ĉiujn dezirantojn en la tuttaga ekskurso. La ekskursoj estis tre interesaj kaj vere riĉigis la spertojn de la partoprenantoj.



Dum la postkonferenca ekskurso ni vizitis rifuĝejon, kie ni trovis pli ol 20 esperantistojn (instruas *Francis AGBENOU*, oficisto de AO); tre impresa estis vizito al orfejo, kie instruas *Latifou GBADAMASSI*, kaj al lernejo kie instruas *Pierre HOUENAVO*; ne malpli impresis vizito al unu komercantino – *Julienne*, kiu estas tre progresema persono. Tiu ĉi vivas kun 2 filoj (unu el ili

– *Yayra* – estas e-isto, tial ankaŭ ŝi komencis lerni) kaj ŝi sukcesis fondi propran fabriketon por produkti sapon, kaj ŝi revas pri plivastigo de la fabriketo. Ĉiuj eksterafrikaj partoprenantoj kunportis laŭ siaj ebloj diversajn materialojn, kiuj estis ekspoziciataj dum la tuta konferenco kaj disdonitaj en la lasta tago. Fine de la konferenco ni plantis oranĝarbon en Songhai Centro, la afrikaj samideanoj baptis ĝin „ILEI-arbo“.

La afrikaj samideanoj petis klopodi okazigi pliajn E-aranĝojn en Afriko, ĉar ili volas lerni mem organizi internaciajn aranĝojn.

La 41-a konferenco de ILEI okazinta en Portonovo, Benino, estis la unua internacia E-aranĝo en Afriko, kiu kunvokis ne nur afrikajn samideanojn. Nek UEA, nek TEJO aŭ iu alia E-organizaĵo ankoraŭ kongresis en tiu ĉi kontinento. ILEI faris la unuan paŝon kaj – mi devas diri – ne mispaŝis. Laŭ la opinio de la partoprenantoj, la konferenco estis sukcesa. Mi samopinias.